É 100% Regular
Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.
Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO, AGO,2010
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj
Krom foraj loĝantoj R$ 1,00.

## MISFARO

Mi vekiĝis. Erare mi faras, sendante GISTOn al malsolidaraj gesamideanoj. Nia periodaĵo celas teni kune niajn geamikojn kapablaj plene kompreni tion kion ili legas kaj, certagrade, devigi ilin fariĝi ĉeestaj geamikoj dum nia monata kunsido, kun la celo babili kaj elmontri esperantaĵojn ĉefe kiam ĉirkaŭas nian tablon multaj neesperantistoj, por montri ke Esperanto ekzistas kaj viglas.
Konstateblas ke mia politiko maltrafas la solidarecon pro la fakto ke la alsendado igas ilin neglekti sian solidaran devon, montri sin al la geamikoj kaj al ekstera publiko. Tial, de nun mi pretigos nur nombron da Gisto-kopiaĵoj laŭ estimata kvanto da aktivuloj kiuj sentas plezuron kiam ili revidas aktivajn geamikojn kaj samtempe plezurigi la tutan grupon per sia ĉestanta figuro de fekunda semo ĉiam preta por kreskigi la anaron. Oni ja devas premii ĉeestemon, ne pigrulojn kiuj pensas:mi lasos mian vakan lokon por homoj kiuj pli ol mi bezonas plibonigi sian fluan parolkapablon. Se tiel, jen plia miso. Bonaj parolantoj ŝuldas sian ĉeeston, por paroligi timemajn novulojn per sia vasta repertuaro plus parkerigitaj altiraĵoj. Aldone mi mencias, ke ne validas fuŝa promeso: venontan kunsidon mi prezentos ion kaj, en la difinita tago ne aperi kaj fantazii pravigan senkulpigon. Delonge mi “predikas” ke ĉiu el ni devas posedi stokon da teksto(j) por uzi ĝin kiam oportunas. Malfacilas inventi ion taŭgan kiam ebla interesato pri nia “facila” lingvo petas: diru kelkajn frazojn, mi volas aŭdi, kiel ĝi sonas

Aldone mi malkaŝas mian duan intencon per la mencio “Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00” estas tio: instigi najbarajn loĝantojn fariĝi solidaraj kun la malmultaj aktivuloj (preskaŭ ĉiam nur la samaj vizaĝoj), ke la ceteraj pagu siajn solidaran ŝuldon kaj ke tiel ariĝos groŝoj kiuj falu en kason de la VK-rondo, por helpi pagi la konsumon okazintan dum ĉiumonata kunsido.

## ETA RAPORTO

Nia kara Arno, la turistemulo, reveninta el la lasta E-evento okazinta en KampoGrande-MS sendis al mi leteron per kiu li informis kaj komentis tiun kunvenon. Ĝi inaŭguriĝis la 13an.de julio. Okazis paroladoj kaj, bedaŭrinde, ankaŭ krokodiladoj tamen estis la solida verda kolono nomata Nejde Barros Ŝi bele kantis kaj deklamis, ĉion en modela Esperanto. Ceterajn tagojn oni pasigis ĉe prezentadoj, balo, festoj kaj kantoj. Ŝajnis ke al SanktPetro Esperanto ne plaĉas. Li provizis daŭrajn pluvotagojn kaj malvarmon, kio malhelpis ekskursojn sed, malgraŭ ĉio, varma etoso regis la kongreson kaj ĝojigis la ĉeestantaron. Aldone menciindas ke la gaŭĉa mateo, la ĉimarono, servata de nia kompano Olavo sensoifigis la gaŭĉaron tie arigitan. Estis bela okazo konatiĝi kun elstaraj gesamideanoj kaj praktiki la lingvon. Amiko Arno invitas nin ĉiujn karavane partopreni la venontan Tutlatinamerikan Kongreson kiu okazos venontan jaron en la urbo SanPaŭlo. Aldone venis salutkarto el la germana Herzberg, la Esperanto-Urbo.

## EDZIĜAJ RISKOJ

Gefraŭloj enuas kaj evitas aŭdi pri danĝeroj en kiujn ili metiĝas en la momento kiam ili interkonsentas ligi sin per edziĝo. Pratempe la danĝeroj estis ne tiel nombraj. Tial, pli ofte la kandidatoj enpensiĝe konstatas ke, kiu pensas, tiu ne edziĝas kaj kiu edziĝas tiu ne pensis – pri la riskoj kiujn tio signifas.Konsiderindas ĉu pro la nuntema sekslibereco, ambaŭ iam suferis aidosinfekto inter pluraj aliaj eblaj malsanoj. Sufiĉas legi pri tio en specifaj periodaĵoj. Sed ekzistas ankaŭ gravaj heredaj riskoj kiuj manifestiĝas nur post kiam oni mendis heredanto(j)n, ekz. O- aŭ X-formaj gamboj. Tiuj suferos diskriminacion, ne povas servi en la armeoj, malgraŭ ke ili tre deziras tion. Nu, tiaj plus multaj aliaj misoj estiĝas dum ili plenkreskas. Kulpas laX-aŭ Y-genoj, ne kontroleblaj. Tiuj, por ne paroli pri la anemio kaŭzata de sanga malsano, en afrikanidoj sed tiaj, bonŝance, ne tro ofte okazas sed ja estas konsiderendaj. Jen eroj fizikaj sed ne malpli gravaj estas edukecaj diferencoj de la paro, kiuj montriĝas post kiam la rutina vivo prezentas ne ĉirkaŭireblajn malfacilojn kun du opinioj kontraŭstaraj Junuloj memoru ke amo ne pagas elspezojn necesajn! Tial pli bonvenas, antaŭ la edziĝo, laŭ germanligva rekomendo : „Lieber ein Ende mit Krach als ein Krach ohne Ende” = Prefere fino per batalo ol kverelado senfina.

## JES JA!

Domaĝe tiu tre interesa periodaĵo far Cezar ne plu karesas scivolulojn kiuj ne posedas komputilon. Hazarde mi trovis la eldonaĵon de majo/junio 2009 kaj relegis kelkajn el ĝiaj sciigaj eroj. Ekz.En Ĉiuŝan, Ĉinio, oni starigis tabelon: Lenanto kiu kverelas punpagas 10 ĵuanojn kaj devas dum tuta monato balai la lernejkorton;pagas unu juanon kiu ne faris la hejmtaskon.Brazilo, tuj imitu !

El la sama Jes Ja! – HUMORO.

Du italoj en senhoma insulo : post unu horo ili ekkverelas. Du usonanoj sur iu senhoma insulo, baldaŭ denuncas unu la alian pro invado de privata propraĵo. Du britoj en senhoma insulo:post du jaroj ili ankoraŭ ne interparolis ĉar neniu prezentis unu alian.

>>Verda Kafo meritis anoncon kun varma invito al partopreno en la tradicia kunsido. Dankon, kara amiko Cezar! Gisto kun plezuro reciprokas.

>>Pasko 2009, 12/04, papo Benedikto deksesa adresis bondezirojn en 63 lingvoj, inkl. en Esperanto. Ĝi vidigas bildon sur kiu vico da gesamideanoj portas stangon kun grandaj literoj vicigitaj, kiuj legigas la vorton Esperanto.

>>La amo estas flugiloj kiuj Dio donis al homo por flugi ĝis Li.(Roger Patrón Lujan)

BonHumoro

## ADIAŬO

Kvin ebriuloj sur perono staraĉis apogante sin unu je la alia. Kiam la trajno ekvidiĝis la tri stariĝis antaŭ oportuna pordo. Kvar el ili envagoniĝis. Unu postrestis.Gardisto vidinte la scenon decidis demandi: ’la amikoj forveturis kaj vi restis sola? » Ja vere sed okazas ke nur mi devis forvojaĝi. Ili venis nur por adiaŭi min.

## SENKULPA

Veterana laboristo, diligenta, alvenas hejme iom pli frue ol kutime kaj trafas la edzinon ĝuste dum la faro, en sia lito, kun fremda viro. Furioza li tenas la revlveron ĉekape de la ulo. – “Restu trankvila, sinhoro, mi ne kulpas, mi estas nur almozulo kaj via edzino tro serioze konsideris miajn vortojn”. – Kion vi diris al ŝi?. – Jenon: “Ĉu vi povas doni al mi ion ajn kion via edzo ne plu uzas?”

Ne plu restu inert akiel malamiko en fremda tranĉeo...estu vigla samideano!!